

& Manio plibonigoza akuta:

< Rekante 19 el 35 batoj por strofo, entute 315 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohema revuo Esperantista, novembre 1910) kun moto "Tiam en la kapon kuraĝa pens' al mi subite venis... (El "Hamleto".)". Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por "Konfeso" kaj modifita rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 Ne povinte lastan nokton ; eĉ nur unu horon dormi, ; mi pripensis, ĉu mi povus ; nian lingvon trareformi.

(×: **Nodojn li foje elbuŝas, ; Per klopedoj lingvon fuŝas ; La simplecon perdas li, ; Nodojn li foje elbuŝas.**)

'2 Anstataŭi la finaĵojn ; kaj aldoni novan kazon ; kaj starigi nian lingvon ; tute sur logikan bazon.

'3 Speciale la finiĝojn ; aĵo, umo, emo, igo, ; oni devus jam forĵeti, ; por la lingva plibonigo.

'4 Kiam mi pri lingvo pensis ; kaj pri ĝia fundamento, ; naskiĝis en mi ideo ; pri problema homa gento.

'5 Nia gento estas vere ; fuŝfarita ĉe la fondo ; kaj li, kiu ĝin bonigus, ; estus fama en la mondo.

'6 Oni povas tion diri ; tute sen la embaraso, ; el kreaĵoj, ke la homo ; plej malbona estas raso.

'7 Mi proponos, tuj mi pensis, ; ŝanĝi tiun homan staton ; kaj por tiu celo krei ; ian homan komitaton.

'8 Kaj ĉi tiu komitato ; devus trovi fundamenton ; kaj ni laŭ ĝi plibonigos ; la fuŝitan homan genton.

'9 Sed se tiu komitato ; tre prokrastus la decidon, ; mi mem kreos novan homon, ; reformitan homan – idon.)